

Mortis prof. Anĉelko Runjiĉ, eksprezidanto de la kroata parlamento (Sabor) kaj esperantisto

Aldonita de Radenko Miloĉeviĉ
18/09/2015

Kiel mi malkovris, ke mia amiko kaj profesoro Anĉelko Runjiĉ, karese nomita Bambe, estis esperantisto? Antaŭ pluraj jaroj, revenanta iun tagon el esperantista kunveno, mi vizitis kafejon sur la zagreba "Malgranda placo", oficiale titolita Brita placo. Tie mi renkontis s-ron Runjiĉ. Post lia demando de kie mi venas, kaj mia respondo pri la esperantista kunveno, li demandis min E-lingve: Ĉu vi parolas Esperanton? En la posta kroat-lingva interparolo mi eksciis, ke li estis multjara esperantisto, sed pro sia profesora kariero en la Ekonomia fakultato de Zagreb kaj pro la politikaj funkcioj, li ne sukcesis multe okupiĉi pri Esperanto. Li konsentis fariĉi membro de Unuiĉo de zagrebaj esperantistoj, sed pro la multjara malsano, malgraŭ sia varma deziro, li ne sukcesis aktivi por Esperanto.

Kiel mi malkovris, ke mia amiko kaj profesoro Anĉelko Runjiĉ, karese nomita Bambe, estis esperantisto? Antaŭ pluraj jaroj, revenanta iun tagon el esperantista kunveno, mi vizitis kafejon sur la zagreba "Malgranda placo", oficiale titolita Brita placo. Tie mi renkontis s-ron Runjiĉ. Post lia demando de kie mi venas, kaj mia respondo pri la esperantista kunveno, li demandis min E-lingve: Ĉu vi parolas Esperanton? En la posta kroat-lingva interparolo mi eksciis, ke li estis multjara esperantisto, sed pro sia profesora kariero en la Ekonomia fakultato de Zagreb kaj pro la politikaj funkcioj, li ne sukcesis multe okupiĉi pri Esperanto. Li konsentis fariĉi membro de Unuiĉo de zagrebaj esperantistoj, sed pro la multjara malsano, malgraŭ sia varma deziro, li ne sukcesis aktivi por Esperanto.

Prof. d-ro Anĉelko Runjiĉ, estis iama dekano de la Ekonomia fakultato en Zagrebo, verkisto, eksa kroata politikisto kaj la lasta prezidanto de la parlamento (Sabor) de iama Socialisma Respubliko Kroatio. Ĉe la komenco de la demokratiaj ĉanĉoj sojle de la 1990-aj, li apartenis al la t.n. demokratia alo de la tiam reginta Partio. Prof. Runjiĉ subskribis la Leĉon, per kiu en Kroatio estis enkondukita plurpartieco. Tiutempaj tagĉurnaloj skribis ke, transdoninte la decidon pri multpartiaj balotoj en Kroatio, li ĉojkriis, ke li estas tre feliĉa ĉisvivinte tiun historian tagon. La 30-an de majo 1990 li transdonis la regpovon en la Respubliko Kroatio al la Kroata Demokratia Unuiĉo (kroate: HDZ), kiu venkis ĉe la liberaj multpartiaj balotoj.

Prof. Runjiĉ naskiĉis en Perkoviĉ en 1938 kaj en ĉibenik li finis gimnazion. Li akiris diplomon kaj doktorecon en la Ekonomia fakultato de Zagrebo. Li estis ĉ regula profesoro pri ekonomia historio en la sama fakultato. Speciale li okupiĉis pri ekonomiaj ideoj de la du elstaraj kroataj fakuloj ĉ Benedikt Kotruljeviĉ kaj Mijo Mirkoviĉ.

Post la demokratiaj ĉanĉoj en Kroatio li estis ambasadoro en Moskvo ĉis la disfalo de Sovetunio. Pro sia speciala kontribuo al evoluo kaj prestiĉo de la Respubliko Kroatio, prof. Runjiĉ ricevis la Ordenon de kroata plektaĉmo por meritoj.